


Hector Hodler kaj lia patrino kiel modeloj kaj artobjektoj en la pentraĵoj de Ferdinand Hodler

Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli (Svislando)



La figuro de Hector Hodler regule aperas en dudeko da pentraĵoj de la svisa artisto Ferdinand Hodler (1853-1918) kiel bebo, infano aŭ junulo, fine eĉ kiel plenkreskulo. Esence temas pri tri cikloj de la jaroj 1888-89, 1893-95 kaj 1900-6. La celo de ĉi tiu kontribuaĵo estas prezenti tiujn bildojn kaj komenti aŭ analizi ilian enhavon laŭ la konsideroj de la ĉefaj biografiaj de Ferdinand Hodler, Charles Albert Loosli kaj Jura Brüschweiler, kiu verkis specialan libron pri la temo 'Ferdinand Hodler kaj lia filo Hector'¹. Oni multe diskutis pri la motivoj kaj la veraj intencoj de Hodler pentri sian filon en liaj bildoj. Dum Loosli kredis, ke tio okazis pro patrecaj sentoj de Ferdinand rilate al la filo, Brüschweiler preferis supozi ĉefe artajn kaj estetikajn intencojn de la pentristo. Ĉu tiuj interpret-provoj trafas la esencon, estas malfacile diri.

La fruaj bildoj de Ferdinand Hodler, en kiuj lia filo Hector aperis, kaj kiuj neniam formis la parton de la mondfamaj 'sensaciaj' verkaĵoj de Ferdinand Hodler, estas preskaŭ komplete malkonataj kaj forgesataj, samkiel la figuroj de Augustine Dupin kaj Hector Hodler mem, kiuj tamen servis kiel modeloj en kelkaj famaj pentraĵoj de Hodler, pri kio praktike nur fakuloj estas informataj kaj konsciaj.²


La gepatroj de Hector Hodler: Ferdinand Hodler kaj Augustine Dupin

Kiel konate, la gepatroj de Hector Hodler estis **Ferdinand Hodler** (1853-1918) kaj **Augustine Dupin** (1852-1909). Probable en somero 1884 Hodler konatiĝis kun Augustine Dupin, tajlorino, kiu naskiĝis kiel savoĵanino en Ĝenevo kaj ĵus revenis de dujara restado kiel servistino en Madejro. Pri tiu ĉi virino Hodler pentris tutan serion de tre realismaj vidaĵoj, en diversaj situacioj de ŝia vivo. La unua bildo pri Augustine Dupin datiĝas el 1884 kaj montras simplan virinon kun krudaj trajtoj kaj melankolia rigardo. En ĉi tiu serio ekzistas du versioj, kiuj montras Dupin kun flanken kaj suben direktataj rigardoj. El la sama periodo devenas la pentraĵo *Augustine Dupin kudranta*, *Augustine Dupin malsana en la lito*, *kun trikanta patrino*,

¹ Vd. Jura Brüschweiler: Ferdinand Hodler und sein Sohn Hector. Neujahrsblatt der Zürcher Kunstgesellschaft 1966/1967. Vd. ankaŭ: Der frühe Hodler. Das Werk 1870-1890. Benteli Bern 1981; kaj la detalan Hodler-kronologion de Jura Brüschweiler en la katalogo akompane al la Hodler-ekspozicioj en Berlino, Parizo kaj Zuriko de la jaro 1983. Zürich 1983 (2a korektita eldono).

² Eĉ en la Esperanto-movado mem tiuj temoj, personoj kaj bildoj estas sufiĉe nekonataj, kaj nur malmultaj esperantistoj interesiĝis aŭ okupiĝis pri ili, se entute. Universala Esperanto-Asocio (UEA), kiu estis fondita de Hector Hodler en 1908 en Ĝenevo, esence neglektadis tiun aspekton de sia historio, kaj eĉ okazis, ke ĝis 2008 la libro de Brüschweiler, menciita en piednoto 1, ne estis konata ĉe UEA kaj evidente mankis en la 'Biblioteko Hector Hodler' en Roterdamo (!!!).

Dormanta Augustine kaj *Augustine Dupin senseliganta frukton*, kun kato (ĉ. 1885). Dupin servis ankaŭ kiel modelo por la pentraĵoj *Kuraĝa virino* kaj *Surprizita de la ŝtormo* de 1886, kiujn Hodler kreis okaze de la Diday-konkurso. La bildo ilustras la dramatan lukton de la homo kontraŭ la furiozaj naturaj fortoj. Ĝi simbolas ne nur la timon kaj la malfacilan lukton por vivo kaj agnosko, sed ilustras ankaŭ la bravecon kaj kuraĝon de la vivkunulino, kiu mem estis la idealo de la forteco. Aliaj bildoj montras ŝin kun grandaj okuloj kaj iomete malfermata buŝo. En la jaro de la naskiĝo de **Hector** (1887³) oni vidas ŝin en graveda stato kaj de la flanko kun longaj haroj kaj kunplektitaj manoj sur la ventro (*Esperanta virino*). La bildoj pri Augustine Dupin el la jaro 1887 postlasas la impreson de konsternata virino, kiu estas plena de zorgoj, kiu ne scias kion ŝi faru kaj kiu draste maljuniĝis.



La gepatroj de Hector Hodler: Ferdinand Hodler kaj Augustine Dupin (1887)

La jaro 1887 estis malfacila por Hodler kaj do reala kaŭzo por persista pesimismo: Lia *Lavango* ricevis nur la trian premion en la Calame-konkurso (200 fr.), kaj lia ekspozicio en la artodomo de Berno ne trovis la deziratan aprezon kaj ne alportis la esperatan mongajnon. En Langenthal, kie li restadis kvaronan jaron por 'riposi' de Ĝenevo, kie li ne estis tre sukcesa, li prilaboris sian *Korteĝon de la ŝvingantoj*. Anstataŭ al la patrino de sia filo, Hodler edziĝis al Bertha Stucki, kun kiu li konatiĝis en julio 1887 en Därligen, Berna Oberlando, ĝuste kiam Dupin estis graveda. La geedziĝo kun la 21-jara Stucki okazis la 18an de julio 1889 en La Chaux-de-Fonds, meze dum la laboro pri la *Nokto*, en kiu kaj Dupin kaj Stucki estas ŝajne videblaj. Sed la komuna geedza rilato ne daŭris longe. La geedzeco estis divorcita jam du jarojn poste la 11an de julio 1891, kaj Hodler reiris al Augustine Dupin kaj ties komuna filo Hector, kiun li komencis adori kaj idealisme 'altigi', ĝis kiam li fariĝis la *Elektito*. La patrino mem ne estis idealisme altigebla, ĉar ŝi restis tro simpleca, tro proleteca, tro vivrealisma estaĵo kiel Hodler mem. Laŭdire, Dupin rezignis pri la geedziĝo kun Ferdinand Hodler, ĉar ŝi ne volis ĝeni aŭ ligi la pentriston, pri kiu ŝi komprenis, ke li strebas al pli altaj celoj aŭ sferoj, per geedzaj devigaj kaj ŝarĝoj. Dupin vivis kun sia patrino en mizera loĝejo en la kvartalo Eaux-Vives, ankaŭ post kiam Hector estis naskita, kaj eble laboris kiel lavistino. Hodler kontribuis al la financado de ŝiaj vivado kaj loĝado. Sian filon li agnoskis la 6an de majo 1888 kaj registrigis lin kun sia familia nomo en la ĝeneva listo de loĝantoj. La koncerna dokumento ricevis sian esencan signifon nur la 14an de decembro 1907, post kiam Hector atingis la 'plenan' (maturan) aĝon (20) kaj fariĝis, pere de sia patro, ano de la origina civito de Gurzelen en la berna kanton, kvankam nek Hector nek Ferdinand loĝis tie. Tiaj estis kaj estas la juraj kutimoj en Svislando.

³ Li naskiĝis la 1an de oktobro, do nur kelkajn monatojn post la apero de la *Unua Libro* de la Lingvo Internacia (Esperanto), kies aŭtoro estis L.L. Zamenhof en Varsovio.



Ferdinand Hodler: *Studoj pri la kapo de Augustine Dupin*, *Augustine Dupin kudranta* (ĉ. 1885), *Esperanta virino* (1887)



Ankaŭ sur la bildo *Virino promenanta ĉe arbara rando* (1885) Augustine Dupin estas videbla



Kuraĝa virino, *Surprizita de la ŝtormo* (1886)



Kvankam temas nur pri fantaziaĵo, en la *Nokto* (1889-90) probable estas videblaj Ferdinand Hodler (meze), Augustine Dupin (maldekstre) kaj Bertha Stucki (dekstre)

Unua Hector-Hodler-ciklo: La bebo (1888-89)

En la jaro de la naskiĝo de Hector lia 34-jara patro Ferdinand Hodler jam estis iomete konata kiel pentristo. Li estis malkovrita de Barthélemy Menn (1815-93), fama instruisto pri figura pentrado en la arta lernejo (École des Beaux-Arts) de Ĝenevo, kiu invitis la 'sovaĝan' alemanon partopreni en sia „pentroarta akademio” kiel „libera lernanto”. Tiu sukceso signifis por la juna kaj ambicia pentristo el Berno ne nur grandegan ĝojon, honoron kaj fieron sed ankaŭ gravegan cezuron por lia kariero kiel artisto. Pere de Menn Hodler emancipiĝis de la turisma kiĉpentrado, kiu tiam furoris en Svislando kaj kiun li lernis ĉe Ferdinand Sommer en Thun, por adopti pli modernan stilon, kiu tiam estis moda en Eŭropo (impresionismo, ekspresionismo, simbolismo ktp.). Ferdinand, kiu ankoraŭ ricevis malmultajn pagitajn mendojn kaj dume restis malriĉa homo, partoprenis la pentro-konkursojn de Diday kaj Calame en Ĝenevo, tra kies kanaloj povis esti prezentataj liaj unuaj majstroverkoj kiel *En arbaro ĉe Frontenex*, *Rigardo sur la ĝenevan havenon*, *Bankedo de la gimnastikistoj*, *Ripozo ĉe la arbara rando*, *Muelisto*, *lia filo kaj la azeno*, *Kalvino kaj la profesoroj en la korto de la ĝeneva gimnazio*, *Surprizita de la ŝtormo*, *Kuraĝa virino*, *Alpa pejzaĝo kun Stockhorn*, *Lavango*, *Kolera militisto*, *Dialogo kun la naturo* k.m.a., por kiuj Hodler rikoltis unuajn premiojn kaj honorajn menciojn. La artkritikistoj de la loka gazetaro, mokemaj, snobismaj kaj arogantaj kiel ili estis, reagis ĉefe negative, konfuzite kaj kontraŭstare pri la „strangaj kaj malbelaj” produktoj kreitaj de la nova pentristo, sed Hodler obstine sekvis sian vojon kaj fariĝis pli kaj pli konata, tiel ke krom mokantoj, rifuzantoj kaj neantoj aperis ankaŭ kelkaj admirantoj, aplaŭdantoj kaj apogantoj, kiuj helpis al li progresi kaj ne perdi la kuraĝon.

Kiam Hector naskiĝis, Ferdinand kreis apartan ciklon de pentraĵoj, kiuj datiĝas de la jaroj 1888-89, portante la titolon *Patrino kaj infano* kaj ampleksante almenaŭ kvin-ses bildojn, kiuj montras la patrinon Augustine Dupin kun la fileto Hector en diversaj situacioj. En ĉi tiu ciklo elstaras unuavice la belega bildo montranta la patrinon kun sia bebo kvazaŭ Madono, kiu portas Jesuon en siaj brakoj. Eble ĝi apartenas al la plej belaj tiuspecaj bildoj, kiuj estis kreitaj en la 19a jarcento. Sed ankaŭ la scenbildoj *Hector sidanta*, *Hector dum la matenmanĝo*, *Patrino kun infano* (en la lavejo, kuirejo kaj ĝardeno) formas integran parton de la bildoserio de tiu fazo, en kiu Ferdinand evidente ŝatis pentri intimajn scenojn el la familia vivo. Kreante ĉi tiun ciklon, Hodler ne troviĝis sub la premo de iu konkurso, kaj oni fariĝas atestanto de la ĝojo, feliĉo kaj optimismo de la gepatroj, kiuj revenis post la naskiĝo de la filo. Kvankam la bildoj de tiu ciklo ne tiel famas kiel la postaj pentraĵoj de Hodler, ili tamen estas aprezindaj kiel integra parto de la frua verko de tiu svisa nacia pentristo, kiu serĉis sian propran stilon kaj sian propran vojon al la sukceso kaj agnosko, malgraŭ fortega kontraŭstaro flanke de la artkritikistoj, kiuj baris al li tiun vojon, precipe en Svislando, per diversaj obstakloj kaj rimedoj.



Unua ciklo de pentraĵoj pri Hector Hodler: *La bebo* (1888-89), foto kun la pozanta Hector (daŭrigo sube)



Dua Hector-Hodler-ciklo: La infano (1893-95)

La dua ciklo, kiu estiĝis en la jaroj 1893-95, do post la *Nokto*, ampleksas la trilogion *Preĝo* aŭ *Alpreĝado*, *Ravata* aŭ *Ĉarmata knabo* kaj *Elektito*. En tiu serio de pentraĵoj Hector estas videbla surgenuanta, sidanta aŭ staranta, parte nuda, sur herbejo florplena. Ĉe la *Preĝo* aŭ *Alpreĝado* kaj *Ravata* aŭ *Ĉarmata knabo* temas pri unufiguraj kompilaĵoj, kiuj en si mem estas memstaraj, kvankam ili samtempe formas parton de la *Elektito*. Tri bildoj montras Hectoron en herbejo, kiu estas plena de floroj, kun kunplektitaj manoj kiel en la *Elektito*. Hodler nomis tiujn bildojn *Preĝo* aŭ *Alpreĝado*. Estas malfacile diri, laŭ kiu sinsekvo Hodler pentris tiujn bildojn. Brüscheweiler kredas, ke ili aperis post la *Elektito*, kun la escepto de *Alpreĝado I*.

Tri bildoj prezentas Hectoron kun floroj en la manoj. Ili ricevis la titolon *Ravata knabo* (aŭ *Ĉarmata knabo*). La knabo, kiu tenas branĉetojn, ŝajnas esti allogata de ilia forma reguleco. La ĉefa temo de tiu ciklo traktas la harmonion inter homo kaj naturo. Oni retrovas la estetikan principon kaj la mistikan sencon, kiu funkcias kiel bazo en la *Elektito*. Sian filon Hodler perceptis kiel simbolon de la naturo kaj de la strebado al la sukceso. De la *Ravata knabo* ekzistas minimume tri diversaj versioj, kiuj probable ekestis en la jaroj 1893-95 kaj kiuj ne respiegulas simple kopiojn sed tri unuopajn perceptojn aŭ sentojn de la sama temo.

La *Elektito*, kiu signifas kulminon de la hodlera simbolismo, estas granda kompilaĵo, disradiana la festan etoson de sakrala rito kiel religieca natur-sento. La genezo de la pentraĵo ne estas tute konata, sed, kiel dirite, ĝi konsistas el elementoj de *Alpreĝado* – kaj de la bildoj *Kion la floroj diras* (ĉ. 1893) kaj *Kortuŝiteco* (1894).⁴ Filo Hector unuafoje aperas en ikonografia formo. La junulo estas akceptita en la rondo de la printempaj heroldoj, kies elektito li estas. Surgenue antaŭ arbeto la junulo petas la favoron de la ŝvebantaj anĝeloj kaj ricevas la benon de la geniuloj. La bildo, kreata laŭ la principoj de la hodlera paralelismo, eble esprimas la preĝon de Ferdinand Hodler, en kiu li petas la printempon, ke lia infano prosperu kaj fariĝu forta kaj sana viro. Hodler timis, ke ankaŭ lia filo povus esti trafita de ftizo, la tipa familia malsano, kaj de la materia malriĉeco, en kiu li mem troviĝis. Laŭ Brüscheweiler ĝi signifas ankaŭ la mistikan petegon de Ferdinand Hodler al la adreso de la benantoj favori la propran sorton kun la espero pri persona gloro. La pentristo utiligis ĉiujn rimedojn por atentigi pri sia verko. Sed postaj interpretistoj prezentis ankaŭ diversajn fantaziajn klarigojn. Resume, la *Elektito*, kiun Hodler komence nomis *Feinoj anoncas la printempon* aŭ *Printempaj heroldoj*, povas esti komprenata kiel mistika esprimo de la espero, kaj la infano en la centro estas la objekto kaj portanto por esprimi tiun esperon. Por Hodler mem la bildo estis „kiel rozo aŭ similaj formoj, kiuj grupiĝas ĉirkaŭ iu centro“. Charles-Ferdinand Ramuz, unu el la plej famaj svisaj verkistoj, laŭdis tiun ĉi pentraĵon de Hodler ankoraŭ 35 jarojn post ĝia kreado kiel ion, kio postlasis al li „la impreson de la grandeco“.

⁴ Vd. <http://ecx.images-amazon.com/images/I/41yLVylpXVL.jpg> kaj https://reproarte.com/images/stories/virtuemart/product/hodler_ferdinand/0270-0090_ergriffenheit.jpg aŭ http://www.liveprint.de/pictures/HF00/HF00_00037.jpg



Dua ciklo de pentraĵoj pri Hector Hodler: *Elektito*, *Preĝo* aŭ *Alpreĝado I kaj II* (Ĉ. 1893) ...



... *Ravata* aŭ *Ĉarmata knabo II kaj III*, *Sidanta knabo kun branĉoj*

Pri la *Elektito*, kiu evidentigas rilaton de Hodler al la esotera-mistika ordeno de la Rozkrucistoj,⁵ de kiu Hodler ŝajne sentis sin allogata en tiu periodo, la ĝeneva ĵurnalisto Gaspard Vallette, kiu bonvole observis sed severe pritaksis la laboron de Hodler, komentis en *Gazette de Lausanne*, ke en la unua momento oni sentas sin forpuŝata de ĝi kaj komencas aprezi ĝin nur post dua rigardo por konstati la „belecon de la teknika realiĝo”. Ekzakte tian sperton faris verŝajne multaj spektantoj de la hodleraj pentraĵoj. Vallette ŝajnis esti tiel ravata, ke li ne povis ne aldoni al sia komento la tenton nomi Hodleron ankaŭ „poeto”, kiu devas esti konsiderata kiel plej bona desegnisto en Ĝenevo. Krom tio, en la knabeto Hector Vallette vidis la personigon de la „genio, antaŭ kiu troviĝas ĝojoj kaj suferoj”.

Sed la atendoj, kiujn Hodler investis en la *Elektiton*, ne plenumiĝis. La pentraĵo, kiu estis prezentita en aprilo 1894 en la salono de Champs-de-Mars en Parizo, ne kaŭzis la saman entuziasmon, kiun siatempe kaŭzis la *Nokto*, ĉar la pariza kritiko malmulte favoris la mistikemon de la kruda pentristo el Helvetio, al kiu mankis francaj edukado kaj artsento.

La valoro de la *Elektito*, kiu troviĝas en iu muzeo en Germanio, aktuale estas taksita je dek milionoj da eŭroj.⁶

⁵ Gvidata de „Sâr” Merodack Joséphin Péladan, franca verkisto kaj okultisto, kiu celis detrui la realismon kaj konduki la arton al la ideoj de la katolikismo kaj mistikismo.


⁶ Vd. <http://www.derwesten.de/wp/staedte/hagen/der-auserwaehlte-lagert-nun-sicher-im-depot-id6282931.html>.

Tria Hector-Hodler-ciklo: La junulo (1900-06)

Ekde 1897 Ferdinand Hodler estis tro okupata pri sia projekto *Marignano*, kiun li pentris por la Svisa Nacia Muzeo en Zuriko kaj kiu famigis lin tra la tuta lando. Krom tio, en la sama jaro li pentris la *Tagon*. La aktualaj prioritatoj de Hodler malhelpis la kreadon de novaj bildoj pri Hector. Tamen. La artisto almenaŭ postlasis kelkajn desegnaĵojn kiel *Paŝanta junulo*, *Staranta junulo* kaj *Junulo ĉe la rivero*, kiuj aperis en 1901 kaj por kiuj eble ankaŭ Hector servis kiel modelo, almenaŭ image.

En 1900 Hodler fariĝis ne nur membro de la 'Berlina Secesio', sed li ankaŭ aniĝis en la 'Viena' kaj 'Munkena Secesioj', do li estis akceptita kiel membro de la plej gravaj artunuiĝoj en Eŭropo. En 1901 Hodler povis prezenti siajn bildojn ankaŭ en la XIIa Viena Secesio, kie la publiko vidis interalie la *Printempon* kaj la *Elektiton*. Laŭ la legendo, ankaŭ la aŭstra imperiestro Francisko Jozefo persone aperis por admiri la pentraĵon kaj por konstati kun perplekso, ke en la bildoj de Hodler la „anĝeloj efektive ŝvebas“, kiel Hodler raportis en letero al Albert Welti. Ok-naŭ pentraĵoj povis esti venditaj. Iu viena artkolektanto (nome la juda okulkuracisto Anton Loew) pagis por la *Elektito*, kiun Hodler rekopiis en 1903 (ĉar la unua versio estis teknike malkontentiga), 6000 markojn, t.e. 7500 frankojn. Pri la reagoj post la viena secesio, kiu esence kontribuis al la diskonigo de la svisa pentristo en Eŭropo, Hodler estis pli ol kontenta, kaj oni povas diri, ke la anĝeloj aŭdis la preĝon de la pentristo kaj plenumis ĝin. La viena sukceso do finfine ankaŭ eksekurigis la financon memstarecon de Hodler por longa tempo, eble por ĉiam. La enspezoj el la vendoj de liaj bildoj sumiĝis je 80'000 frankoj. Hodler do subite fariĝis riĉulo, poste fine eĉ milionulo. Li ege ĝuis tiun novan financon sendependecon, sed kiel homo li restis tamen same modesta kaj simpla kiel antaŭe, escepte de la erotika flanko, kiu de tempo al tempo travivis novajn ekscesojn. En 1904 li estis invitita partopreni kiel honora gasto en la unua eksterlanda kolektiva ekspozicio de la XIXa Viena Secesio. La kernon de lia ekspozicio formis 31 pentraĵoj, inter kiuj troviĝis kelkaj kun Hector kiel modelo. La partopreno en ĉi tiu ekspozicio, en kiu interalie ankaŭ Edvard Munch el Norvegio prezentis sian verkon, estis decida momento por la ĝenerala agnosko de Hodler, kiu intertempe fariĝis 50-jara.

La efektiva tria ciklo pri Hector Hodler, inaŭgurita en 1901, do koncernas la pentraĵojn *Printempo*, *Rigardo en la senfinon* kaj *Junulo admirata de la virino*.



Tria ciklo de pentraĵoj pri Hector Hodler: *Printempo* ...

La ideo de la pentraĵo *Printempo* estas la arta prezentado de la adoleskado kaj sensamo, de la volupto, eble ankaŭ esprimi la psikologian kompleksecon de juna knabino, sen havi nimfomaniajn intencojn. Piede de monteto proksimume 13-jara knabino surgenuas je la maldekstra flanko antaŭ la nuda junulo, ĉe kiu probable temas pri Hector, kaj montras sian voluptemon. Ŝia korpo trudas sin al la junulo kaj samtempe ŝajnas rifuzi lin, ŝia piedo preskaŭ tuŝas la genuon de la junulo. La movoj de liaj manoj signalas kaj timon kaj inklinton. La junulino, kiu reĵetas sian kapon, kondutas reteneme sed tamen pretas al la kiso. Al la inklinoj de la junulino la junulo reagas iom indiferece kaj memplaĉe; li tute ne rigardas ŝin, kaj lia rigardo


en la antaŭon senlime perdiĝas, dum sole lia genuo estas direktata al la junulino, kaj la resto de lia korpo retiras sin. La gejunuloj estas solaj en tiu idealisma pejzaĝo, kaj iliaj pozoj malkaŝas la konsciigon pri la seksemo. Ŝajnas, ke Hodler celis dokumenti kaj memorfiksi la fazon de la unua amo de sia filo. Hector tiam estis nur 14-jara, eble ankoraŭ tro juna por senti la unuan veran amon al knabino. Ĉu Hodler konis la teatraĵon 'Printempa vekiĝo' de Franz Wedekind, kiu aperis en tiu tempo kaj traktas la historion de gejunuloj, kiuj dum sia puberteco konfrontiĝas kun sia psika malstabileco kaj la socia maltoleremo pri ilia seksa scivolemo, ne estas konate.

Sed en tiu alegoria bildo pri la naskiĝanta sensamo (aŭ volupto) Brüschweiler ne nepre preferis vidi la vekitajn amsentojn de la pubertulo Hector, ol multe pli la fieran printempon de la propra gloro de Hodler-patro.

Hodler kreis minimume kvar diversajn versiojn de la *Printempo*: Dum la du unuaj estas (oficiale) datitaj en 1901, la ceteraj versioj kreiĝis verŝajne inter 1907 kaj 1913; en 1912 estiĝis unu spegulbilda versio, bazita sur verdaj koloroj. En la plej lasta versio, kiu postlasas la impreson esti rapide verkita kaj ne finfarita, la figuroj estas dekstre-maldekstre inversigitaj.


Kiam en 1901 aperis la unua versio de la *Printempo*, unuafoje iu kritikisto, nome Ludwig Hevesi en la viena *Fremdenblatt*, trovis la kompilaĵon „bela“, fakte „rava“, kvankam en *Neue Freie Presse* lia kolego Franz Servaes, alia germana kritikisto, trovis la bildon „baze mistrafita“ kaj ĝiajn kolorojn „artefaritaj kaj neelteneblaj“, kvankam oni sentas la potencon forton de la naturo. Malgraŭ la mispentrita kruro, „tiu nuda knabeca junulo, kiu leviĝas fiere de la tero, vere estas potenca personigo de la fermentantaj kaj bolantaj fortoj de la naturo“, Servaes notis. En 1904 li skribis eĉ pli entuziasme pri la *Printempo* jenon: „La unua vekiĝo de la volupta sensamo, kiun oni kutime nomas 'amo', apenaŭ iam estis priskribita pli naive kaj pli nature ol en la Hodlera pentraĵo de la *Printempo*.“ Servaes opiniis, ke la „ekstaza sinprezento de la gejunuloj estas komplete nova vizio, kiu ricevis de la pentristo vere klasikan formulon“, kaj ke la „dolĉeco, nepreco, frenezo kaj fascineco de la unua, obtuze eksplodanta seksardo, estas admirinde prezentita ĉi tie.“

En la pentraĵo *Rigardo en la senfinon* de 1902/3 la junulo, denove Hector, staras nuda sur montopinto super la nebulmaro, kun ambaŭ manoj sur la brusto. Provante klarigi ĉi tiun bildon, Brüschweiler atentigis pri la evidenta singloremo fare de la memkontenta pentristo en tempo, kiam lia verkado atingis dume mem la pinton de la propra sukceso. La bela korpo de la narcisisma junulo, kiu tiam estis gimnaziano, kiu verkis interesajn francelingvajn eseojn, por poste fariĝi ĵurnalisto, ne plu estas admirata de iu junulino, sed ĝi estas admirebla de ĉiuj, same kiel la verko de la pentristo mem. Ankaŭ de la *Rigardo en la senfinon* Hodler pentris ne malpli ol kvin versioj, kies prototipo datiĝas de 1900 (ankoraŭ kun la titolo *Junulo sur la pinto*), la dua de 1902 kaj la kvina eldono de 1906.



... *Rigardo en la senfinon* ...

En la *Junulo admirata de la virino* (1903), en kiu revenis la motivo de la *Sentemo* (1901/2),⁷ oni tuj rekonas similecon kun la paralelisma pentraĵo de la *Elektito*, kreita antaŭ dek jaroj, sed nun prezentita kun la adoleskanta junulo, kiu staras dekstre sed tamen en la centro de la atento. La orgojla junulo, jen kun jen sen branĉetoj, esprimas memcertecon, fierecon kaj memplaĉon. Al la kvar virinoj, kiuj estas videblaj de malantaŭe kaj kiuj avide admiras lin, la junulo turnas sian dorson, tiel ke la virinoj ne vidu lian belan korpon de antaŭe. Fakte, ne la junulo mem estas orgojla, sed „la vizaĝo de lia filo nur pruntreprenis la orgojlon de la patro“, kiel Brüşweiler trafe rimarkigis. Sed ĉu la filo vere tiel pozis nuda antaŭ la patro por kvazaŭ lasi sin misuzi por elstarigi la gloron de la patro, aŭ ĉu eble temas nur pri imagata Hector-modelo? Kiel ajn, konkretaj indikoj, kiuj povus doni respondon al tiaj demandoj, mankas.



... *Junulo admirata de la virino*

En postaj jaroj Hector Hodler pozis (aŭ konsentis pozi) denove kiel modelo, ne nepre pro plezuro sed por perlabori monon kaj pravigi la renton, kiun lia patro pagis al li. Krom tio devis esti financata la gazeto *Esperanto* kaj kovrataj la deficitado (aŭ ŝuldoj) de la Esperanto-agadoj.⁸ Edmond Privat postlasis la memoron, ke Hector kutime malgaje rapidis al la patra ateliero por sidadi aŭ staradi tute senmove dum horoj kiel modelo.⁹ Ŝajnas, ke dekon da jaroj Hector tamen interrompis la pozadon, ĉar li mem estis okupata pri Esperanto, kiun li lernis en 1903, kaj dume iris sian propran vojon per la fondo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en 1908 en Ĝenevo.¹⁰ Malgraŭ tio, Hector certe ne rifuzis helpi la patron, kiam li bezonis asiston dum la realigo de grandformataj kompilaĵoj. Ferdinand Hodler jam estis mondfama pentristo, kaj en Svislando la publiko konis lin precipe pro multaj skandalecaj diskutoj kaj la pentrado de *Retiriĝo el la batalo de Marignano* en la Svisa Nacia Muzeo de Zuriko. Havi tian patron, pri kiu la gazetaro skribis multajn malagrablajn aferojn kaj kiu suferis pro iom dubinda reputacio, por Hector verŝajne ne estis nur pozitiva kaj facila sorto, ankaŭ pro liaj rilatoj kun diversaj virinoj.

En 1908, jaro de la fondo de UEA, Hodler ekspoziciis en Frankfurto, komencis pentri la menditan bildon por la universitato de Jena, estis daŭre okupata pri la pentraĵo *Amo*, ricevis la proponon pentri motivojn por la novaj svisaj bankbiletoj, vendis *Vesperan ripozon* al la vintertura muzeo, kie ĝi kaŭzis malagrablan disputon, pentris elstarajn montarajn bildojn en Berna Oberlando, estis elektita kiel prezidanto de la 'Svisa societo de pentristoj kaj skulptistoj' kaj prezentis pejzaĝojn en Laŭzano kaj Zuriko. Treege okupata vivo!

⁷ Vd. <http://kultur-online.net/files/exhibition/empfindung.jpg>.

⁸ Vd. Brüşweiler 1966/67, p. 57.

⁹ Vd. Stettler, Eduard: Hector Hodler, kunfondinto de Universala Esperanto-Asocio kaj de la gazeto Esperanto. Lia vivo kaj lia verko 1887-1920. UEA Genève. 1928, p. 17.

¹⁰ Skiza biografio pri Hector Hodler v. sub http://www.planlingvoj.ch/Hector_Hodler.pdf, kaj skizan historion de UEA en Ĝenevo vd. sub http://www.planlingvoj.ch/UEA_Genevo.pdf. (El: <http://www.planlingvoj.ch/enciklopedio.htm>).

Morto de Augustine Dupin

En marto 1898 Hodler edziĝis al Berthe Jacques (1868-1957), kun kiu li konatiĝis verŝajne plej malfrue en 1894 aŭ eble jam en 1892 aŭ 1893. Berthe Jacques estis la filino de ĝeneva komercisto kaj de instruistino, kiu laboris en pli altgrada knabina popollernejo. La unua konata bildo pri Jacques datiĝas de 1894. Ŝajnas, ke Hodler amis la fratinon de Berthe, Louise Jacques, antaŭ ol edziĝi al Berthe mem (kiu havis la pli belan profilon). Sekve, Berthe fariĝis la ĉefa modelo en la simbolisma periodo de Hodler (de *Tago*, 1899-1900, ĝis *Sankta Horo*, 1907). Berthe Jacques, nomata „Madame Hodlèr“ (sic!), decide influis la akiron de nova pli luksa privata loĝejo ĉe Quai du Mont Blanc 29 en decembro 1913, kiu estis moderne instalata laŭ la stilo de Novarto. Sed ŝajnas, ke la „proleta“ pentristo tamen neniam vere sentis sin hejme en tiu loĝejo.

Dum Augustine Dupin ankoraŭ vivis, en printempo 1908 Hodler konatiĝis kun la plej lasta amo de sia vivo: Valentine Godé-Darel, kun kiu li havos la filinon Paulette, kiu fariĝos la duonfratino de Hector. Post la morto de Valentine Godé-Darel en januaro 1915, Berthe transprenis ankaŭ la infanon Paulette, kiu estis adoptita de ŝi du jarojn post la morto de Ferdinand Hodler, kies nomon ŝi ricevis.


La jaro 1909 estis perturbata pro la morto de Augustine Dupin. Jam de kelkaj jaroj Hector sendadis ŝin al Savojo, por ke ŝi povu eviti la sufokan klimaton en la urbo. En somero 1909 li restadis kune kun ŝi en Le Coin. Kiam Hector revenis de la Universala Kongreso de Esperanto en Barcelono, li retrovis sian patrinnon en tre malsana stato. Ankaŭ Ferdinand, kiu pasigis la someron en Berna Oberlando, alkuris al Ĝenevo por vidi ŝin. Li estis ŝokita pro la malbona sanstato de sia amatino, tiel ke li ne plu forlasis ŝin, ĝis kiam ŝi forpasis la 16an de novembro. En tiu tempo ekestis la famaj pentraĵoj pri la *Mortanta* kaj la *Mort(int)a Augustine Dupin*.



Mortanta aŭ mortinta Augustine Dupin (1909)

Hector Hodler, la oratoro de la unuanimeco

Ankaŭ la *Oratoro*, kiu staras en la centro de la *Unuanimeco*, kiun Ferdinand Hodler kreis por la hanovra urbodomo, ŝajne estas Hector Hodler aŭ almenaŭ lia simbolo, kvankam la figuro mem reprezentas la paroliston Dietrich Arnsborg. La bildo *Unuanimeco* montras la Reformacian ĵuron de la hanovraj burĝoj de la 26a de junio 1533. Aperis dubo, ĉu Hector vere pozis kiel modelo, aŭ ĉu la aŭtoro de la pentraĵo simple imagis sian filon kiel preleganton, kiu intertempe ludis gvidan rolon en la Esperanto-movado, kiu celis engaĝiĝi favore al la unuec(ig)o de la popoloj pere de komuna „neŭtrala“ lingvo. Fakte, Hector Hodler aperis en tiu bildo en altgrade stilizita formo kiel matura, plenkreska viro, kaj la *Oratoro* montras verdire nur kelkajn supraĵajn trajtojn de Hector kiel la linion de la hararo, la iom platan nazoston, la tondon de la lipharoj kaj barbo. Ankaŭ Ferdinand revis pri la (religia) unueco de la homaro, kio estas dokumentita en manuskripto el la jaro 1892 kaj eksplikita en prelego de la jaro 1897: laŭ tio, kio unuigas la homaron estas pli forta, ol kio dividas ĝin. La *Unuanimeco* estas sincera kvankam iom troigita ilustraĵo de tiu konvinko, kiun reprezentis kaj la patro kaj la filo, de kiu li heredis ĝin. Do, krom la mono, kiun Hector ricevis de sia patro, ne necesas forgesi ankaŭ la spiritan influon flanke de la patro al la filo, kiu eble estas pli forta ol oni povis imagi ĝis nun.



Unuanimeco kaj Oratoro, memportreto de Hector Hodler

Memportretoj, malsano kaj morto de Hector Hodler

Ĉirkaŭ 1907-12 estiĝis kvardeko da pentraĵoj, kiuj estis deklaritaj kiel memportretoj de Hector Hodler kaj pentrataj kun patra instrukcio. Ŝajnas do, ke tiuj bildoj kreigis en kunlaboro inter la filo, kiu havis pentro-talenton kaj ŝatis pentri en sia junaĝo, kaj la patro, kiu fakte deziris, ke ankaŭ lia filo fariĝu pentristo. Sed ne estas tute klare en ĉiuj kazoj, kiu estas la vera aŭtoro de tiuj memportretoj. Kiel ajn, la grandanimeco, saĝeco, seriozeco kaj modesteco de Hector Hodler eble estas plej bone esprimita kaj dokumentita per la bildo, kiu montras la fondinton de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kun ĉemizo, kravato kaj solena vestaĵo.

Sed, ho ve, ankaŭ Hector Hodler estis trafita de la hodlera familia malsano, la ftizo aŭ tuberkulozo. Inter 1912 kaj 1917 Ferdinand regule vizitis sian malsanan filon en alpa sanatorio en Leysin kaj migradis kun li al Montana kaj Champéry en Valezo. Post la malsaniĝo de Hector la patro principe ĉesis pentri la filon. Kiam en vintro 1917/18 la pentristo mem eksuferis je la pulma malsano, komenciĝis tragika mortkonkurado inter la patro kaj filo, kies rilatoj intensiĝis ĉefe pere de letera korespondado.

Ferdinand Hodler forpasis la 19an de majo 1918 kaj Hector Hodler mortis la 31an de marto 1920. Iliaj tomboj troviĝas en Ĝenevo (foto vd. ĉi-sube).

La esencon pri la intencoj de Ferdinand Hodler pentri sian filon Brüscheiler konkludis jene: Hodler pentris sian filon ne nur pro tio, ĉar li estis lia patro. La figuro de Hector kovris en la pentroarto de Ferdinand Hodler du gravajn fontojn de inspiro: La naturkulton kaj la ambician strebadon al la sukceso.

Kvankam ambaŭ dimensiojn lia filo sola ne reprezentis, li servis kiel idealo kaj preferata modelo de la pentristo.

© Andreas Künzli, publikigita sur www.planlingvoj.ch en aŭgusto 2015.

Ĉi tiu versio plene anstataŭas ĉiujn ĝis nun publikigitajn aŭ prezentitajn versiojn (en prelegoj k.a.) de la aŭtoro.



Tombo de Ferdinand kaj Berthe Hodler (dekstra parto) kaj de Hector Hodler kaj Lina Emilie Ruch (maldekstra parto) en la tombejo Saint-Georges en Ĝenevo. (Fotis Arlette Di Vetta en majo 2011)

Mia verkaĵo pri Ferdinand Hodler estas elŝutebla sub
http://www.planlingvoj.ch/Ferdinand_Hodler_vivo_kaj_verko.pdf